# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Bob Felby**

PLENUMITA 22/08/2024 sepcentunua eldono (unua eldono 26/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**



**Pasintaj „Aŭstraliaj Esprantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) [http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo](http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo)
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estos sendataj al AEA. (Sen #)


# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon ĉiun tagon
Ne estas facile elekti el la ĉiuj tagprogramoj   Do aŭskultu ĉiujn.

Lavi fruktojn, legomojn kaj foliojn   20/08/2024

## Pri la libro “Iam ni trovs hejmon”




Karaj legantoj de la Aŭstralia reta revuo, mi ĵus legis pri la lasta libro de Trevor Steele pri enmigrado kaj emnigrintoj. mi sentas la bezonon publike laŭdi lin, ĉar li simple riĉigas la esperantan literaturon sed samtempe la esperantan penso-manieron, en ĉi tiu epoko, en kiu la movado ŝajne perdas siajn idealajn motiviĝon kaj nur interesiĝas pri klasika literaturo kun noveloj etaj [ili nomas ilin 'mikro'] aŭ egaj sed nepre sen socia enhavo por ne paroli pri kritiko kontraŭ la ekzistanta mondo. Bone, Trevor, vi maljuniĝas sed kiel la malnova gvardio vi ne kapitulacas. Daŭrigu.

La atentigo estas io ligitaj al mia personaj obsedoj. Mi kaj Sankta Petro nombras la neologismojn de Trevor, kaj en la tago de la lasta juĝo Sankta Petro donos al vi po 100 jarojn en la purgatorio pro ĉiu vorto ne fundamenta kaj neoficiala.



*Renato Corsetti, Londono, Britujo, [renato.corsetti@gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com)*   *Renato Corsetti*

## Ree en la kastelo Greziljono ( apud Angers-Francujo)

Ankoraŭ ĉijare mi vizitis la kastelon por ĉeesti renkontiĝon titolitan “Someras” kaj celebri la naskiĝtagon de unu el la respondeculoj : Jannick.

Dum tiu semajno eblas sekvi lingvajn kursojn laŭ du niveloj, kanti, danci, mediti kaj lerni pri terapio nomata" poziciiga terapio”. Ĝi celas ekkomprenigi ke familio aŭ organizo havas siajn regulojn, hierarkion, kiuj, se oni ne respektas ilin aŭ se ili estas rompitaj pro aliaj kaŭzoj, kreas konfliktojn. Venis esperantistoj el Kroatujo, Polujo, Belgujo, Hispanujo, Litovujo kaj Nederlando krom francoj kaj mi, aŭstralianino.



Dum vizito al la nura muelilo in Francio kie ankoraŭ estas produktata glacio: la muelilo de la Bruère   *Franciska Toubale*

## AEA - aŭgusta sesio de nia prelegserio - dimanĉon, la 18-an de aŭgusto 2024

Kara esperantisto, Ni ŝatas inviti vin al nia aŭgusta monata prezentado por 2024



**Petr CHRDLE (Ĉeĥio)**

**(Mal)konvena informado pri Esperanto**

Fama ĉeĥa esperantisto Petr Chrdle ĝojigas kaj defias vin per surprizaj faktoj pri nia lingvo. Certigu ke vi aliĝu al la diskuto. **Dimanĉe, la 18-an de aŭgusto 2024, je la**

**ATENTU:**

**La sesio komencas 15 min ANTAŬ la sube indikitaj tempoj**

| | UTC | | Loka Tempo |
|---|---|---|---|
| **Sidnejo** | **06:00** | **+11** | **17:00** |
| **Adelajdo** | **06:00** | **+10.5** | **16:30** |
| **Brisbano** | **06:00** | **+10** | **17:00** |
| **Darvino** | **06:00** | **+9.5** | **16:30** |
| **Perto** | **06:00** | **+8** | **15:00** |
| **Novzelando** | **06:00** | **+13** | **19:00** |
| **Ĵakarto** | **06:00** | **+7** | **14:00** |
| **Tokio/Seulo** | **06:00** | **+9** | **16:00** |
| **Londono** | **06:00** | **+0** | **08:00** |
| **Parizo** | **06:00** | **+1** | **09:00** |
| **Moskvo, Kievo** | **06:00** | **+3** | **10:00** |
| **Rio de Janeiro** | **06:00** | **-3** | **04:00** |
| **Novjorko** | **06:00** | **-4** | **03:00** |
| **Vankuvero** | **06:00** | **-7** | **00:01** |

***(Ni ja povas erari …. Por eviti malagrablaĵojn, bv mem kontroli vian tempon Kontrolu mem vian tempon)*** Jen la ligilo:

**https://us02web.zoom.us/j/86183971328?pwd=eDdOSjVhY0ZKY2srbG5aKzIrTENFUT09**

Meeting ID: 861 8397 1328 Passcode: 565425

Ni ŝatas ankaŭ demandi vin ĉu vi volas/pretas/ŝatas/povas prezenti ion dum unu de niaj sesioj de nia prelegserio?

Se vi ŝatus babili iomete, ni komencas la kunvenon 15 minutojn antaŭ la oficiala komenco (do 16:45 Sidneja tempo). Ankaŭ restu iomete post la prezentadoj por neformala babilado.
Se vi maltrafas la eventon, eblos spekti ĝin ĉe nia jutuba kanalo, "Esperanto Australia" post kelkaj tagoj.
Plej amike,Terry, Sandor, Esther, Jonathan, Joanne, Heather *La estraro de AEA (Aŭstralia Esperanto Asocio) Dum la sesio: 1. Bonvolu silentigi vin kiam la prelego komenciĝas kaj malsilentigi vin nur por fari demandon aŭ komenton 2. Bonvolu levi la manon (elektronike) kiam vi volas fari demandon.*